EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IFEF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro 7>** ● Universitatoj ● AMO 82 ● Gepatra Lingvo ● ● Moliero. **< jan. 31**

# Universitatoj kunvenas regule – jen la sekva!

*La "Laborgrupo pri Esperanto en Universitatoj" de ILEI/UEA/TEJO kaj ESF kun IrEA (la irana landa asocio de UEA) okazigas kunvenon:*

**Kunpens(ig)ado pri Esperanto kaj Universitatoj (La 25-a sesio)**

**Ni bonvenigas partoprenadon de ĉiuj interesatoj!**

**Lunde, la 7-an de februaro 2021, je la 13:30 laŭ UTC**

De Internaciaj Korespondaj Esperanto-Universitatoj ĝis Internaciaj Virtualaj Esperanto-Universitatoj - Ĉu ĉio nur fantazio? Kial ne okazas io? Kun gvidado de prof. Renato Corsetti, venu por diskuti pri tio kaj vidi kion ni povas plenumi por pli efike vigligi Esperanton en la Universitatoj tra la mondo!

La kompletajn registraĵojn de la antaŭaj sesioj vi povas spekti en la jutuba kanalo de UEA:

https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5 **kaj la retejo de IrEA:** https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/

Ĝis nun multaj aktivuloj el diversaj landoj partoprenis en la sesioj de la serio, i.a. kaj ekz-e, geprofesoroj Ilona Koutny, Nina Daniljuk, Gong Xiaofeng (Arko), Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Orlando Raola, Federico Gobbo, Dennis Keefe, Vincente Manzano-Arrondo, Byelongo Elisee Isheloke, Francesco Maurelli, Amri Wandel, Ivan Colling, kaj Giridhar Rao.

Jen la aliro al la virtualejo en Zoom:

Kunven-Identigilo: 845 0226 0578

Pasvorto: la nomo de nia karega lingvo per minusklaj literoj

Ekde la projekto de Internacia Koresponda Universitato Komenio (Comenius) en la 1980aj jaroj ĝis la hodiaŭaj projektoj pri Internacia Reta Esperanto-Universitato; ni invitas ĉiujn partopreni en niaj Kunpens(ig)adoj, i. a. kaj speciale aktivulojn el establoj kiel ĈEL, AIS, IKU (ISU), E@I, CED, ESF, ILEI, UEA, TEJO, KAEST ktp.

# AMO 82 bilda raporto de kaj pri la junularo en Ĉinio

Junuloj abundas en Ĉinio kaj tra Azio! Jen la ŝlosila mesaĝo de AMO 82, organizita en Ĉinio, kiu malfermas la novan jaron por AMO. Ĝi frontis la grandan defion altigi la nombron de junaj aziaj membroj en UEA/TEJO. Ĝi daŭris nur du horojn, sed enlasis pli ol dekon da kontribuintoj. Ni alkroĉas la enkondukon de SMG, kaj aldonas multajn ekrankaptojn de la diversaj prezentaĵoj, kiujn ni nun aperigas. La seminario okazis dulingve, en Esperanto kaj la ĉina; la homoj prezentas sin al la mondo, kiel en pluraj aziaj landoj, pere de Esperantaj krom-nomoj. Partoprenis per *Zoom* 53 personoj. Nia kapabla gastiganto estis Venki (en la apuda bildo).




Post la enkonduko, prezentis la vic-prezidanto de TEJO, Albert Stalin Garrido el Filipinoj. La skizis la ĉefajn agadojn de la junuara organizo: trejnadon, kongresojn (2022 en Nederlando), helpadon al sekcioj, aktivan partoprenon en sociaj komunikiloj kaj eksterajn rilatojn. Fine li vokis al junaj ĉinoj partopreni en la agadoj de TEJO.





Dua prezentanto de TEJO, Anya Ferduzi el Indonezio parolis pri la laboroj de TEJO en Azio. Unuavice temas pri la Komuna Seminario (KS), komence por kunigi junulojn el Japanio kaj Koreio, sed nun disvastiĝinta al Ĉinio kaj eble pliaj aziaj landoj. La esperoj estas okazigi la sekvan KS en Ĉinio, eble en septembro aŭ oktobro. Plie li parolis pri la babila komunikilo *Diskord,* kiun aziaj junuloj el deko da landoj uzas. TEJO okazigas krome Gufujajn renkontiĝojn, regule anoncatajn en la Evento-servo de UEA. Kiu ne scias, kio estas Gufujo – demandu TEJO-anon.




Venis la vico de reprezentantino de la ĉina junulara asocio ĈJEL, Gao Shuyan. Ŝi skizis la agadojn de tiu junularo – kreadon kaj enretigon de kantoj kaj ludoj (ne mankas tie pandoj!). Ŝi parolis pri internaciaj kursoj – tiuj en Greziljono kaj SES en Slovakio. ĈJEL invitas junulojn uzi siajn platformojn por krei aplikaĵojn.


Mallonge prezentis sin la ĝenerala sekretario de ĈEL, s-ino Chen Ji, poste tuta serio da junuloj, kelkaj ege junaj kaj ofte freŝaj lernintoj. Ofte, eblis kapti nur la Eo-nomojn: 'Dora' (15-jara lernantino, kiu eklarnis antaŭ 6 monatoj per Duolingo kaj <lernu.net>, 'Rimedo', kiu lernis en la Eo-fako de universitato, 'Jiamin', same komencanto (kies skemon ni montras dekstre), 'iPad', kiu malkovris Esperanton per Google Translate, retserĉis por pliaj informoj kaj lernis la lingvon el la dika gramatika libro PoMEGo, kaj laste 'Krista', kiu lernis la lingvon en teknika universitato.




**AMO malkovras la mankojn**

**AMO proponas solvojn**

**AMO utilas la la movado**










SMG raportis kaj komentas: Jen impona kavalkado de junuloj, kiujn UEA devas malkovri kaj varbi. Entute, inspira seminario!

========= AMO 82 malkovras junulojn! ===========

## Poema recitado per la reto

Petro Palivoda recitas siajn du poemojn: "Muziko de via anim' " kaj “Violonisto”, por la "Galerio de gepoetoj".

https://youtu.be/L15Hyzd1Vw8

mga

## Ondo intervjuas la Esperantiston de la Jaro



En la reto estis publikigita intervjuo kun Halina Gorecka (Kaliningrado, Ruslando), la Esperantisto de la Jaro 2021. Ĉi tiu intervjuo, aranĝita de Paŭlo Fischer-Kotowski, premiere aperis antaŭ unu monato en la decembra (vintra) eldono de “La Ondo de Esperanto”. Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2022/01/gorecka-11/




Petu la afiŝon de la informada kolektivo ZPI, pere de <renato.corsetti@gmail.com>. Ni planas baldaŭ aperigi pli da informoj pri la grupo ZPI (Zorgantoj pri Informado). Tiu grupo rapide agas, ene de tri tagoj ĝi akiris nacilingvajn tradukojn de la afiŝo en dudeko da lingvoj.

========= vortoj: 915 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.